

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

---

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

---

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)  
WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Single Copy Ten Cents.

---

VOL. 23

FEBRUARY, 1919

NO. 6

---

### WHAT ESPERANTISTS STAND FOR

Amerika Esperantisto has been receiving a number of comments lately, some sugared and some the reverse. We are thankful for each and all, even where, as in the following epistle, we cannot take the advice.

La 16a de Decembro, 1918.

Karaj Sinjoroj:

Mi ĵus trovas sur mia skribtablo, sub amaso de paperajo ĉiuspecaj kopion de "Amerika Esperantisto" enhavante, kiel eldonaton: "March 1918." Kiel vi vidas, ĝi ne estas tute nova. Tamen, traŝinginte ĝin, mi opinias ke per kelkaj pliboniĝoj, inter aliaj: dungado de bona Esperanta Redaktoro, vi povus fari el via gazeto almenaŭ bona propagandilo. Mi ĉe konas tre lertajn samideanojn, pioniroj de la lingvo kiuj, ne havante io serioza por fari, povus doni lecionojn al la novaj viaj nove varbitajn legantojn.

Kiel mi vidas vi estas nonaj adeptoj, nekonante multe pri la lingvo; tial vi faras multajn erarojn, kiujn mi povus laŭvere korektigi por vi. Tion vi treege bezonas, kaj nepre demandos min—pagante—ĉu vi estas honesta kaj volas diri veron al viaj legantoj.

Esperante vian proksiman demandojn, **kune kun la mono**

Mi estas

Via plimaljunulo

What does Amerika Esperanto stand for except as an example of Esperanto? Truly, a natural inquiry. We shall earnestly strive to lessen the grammatical errors. But that is not all the reason why this magazine exists. Amerika Esperantisto never forgets an aim in which

Esperanto is the means. We believe that Dr. Zamenhof did not found the language as an end, but as the means to something more. In his native land there were hatreds and the languages were huge walls over which little of sympathy or understanding could grow. Any one who regards the Esperanto movement merely as the attempt to learn or to use a language for personal gain is not in touch with most of us. Our "hoping" is not alone for Esperanto, but for that which we are certain that Esperanto will accomplish. Dr. Fleischer, leader of the Boston Sunday Commons, a few weeks ago, declared his belief that President Wilson had accumulated much of what might be called a **spiritual Esperanto**, to formulate and utter the need and expectations of the aspiring democracy of mankind.

"A common language, in the spiritual sense, is the surest basis of union, whether between one and one in love, or for religious, national, political, economic or whatever human association. It behooves every one who wishes to be really democratic and human to supplement his lesser language with as much of the common speech, the spiritual Esperanto, as will enable him to share the universal experience and aspiration."

There is, indeed, a spiritual Esperanto not to be overlooked, and in our humble opinion, this is nowhere found so clearly expressed as in the meetings and clubs of Esperantists. The ideas of every land come to us directly as they are written in Japan, in Russia, or in Germany in our Esperanto letters and magazines. We feel the thrill of being not merely sectionalists, but citizens of the whole of throbbing humanity. We no longer read about the man of another speech as a curious unexplainable human seen thru the eyes of some reporter or traveler. We read and listen to his very words, and he enters into our mental personality and we become as blood kin. The suffering of the world is our suffering and the striving for a better way of settling questions than by slaying and crippling and starving is our striving also. Until our mind has its open gateway to all the world thru eye and ear and tongue we can but entrust to others all relations with the great world outside,—and today it is said a pocket wireless receiver will talk to us from half way round the globe. In what tongue, pray, Hindustani? or Thibetan? or Mongol? or Russian?

Are we Esperantists cranks? jokes? No, since a certain date in July 1914, we haven't figured so largely in the humorous columns. A few of the powers that be have even condescended to use our central organization and our speech. Perhaps... but to the point. There are among us many live minds; some of us wear our hair long and some short; some of us eat meat, some don't; the great majority of us were pacifists before the war, a few of us were militant pacifists during the war, but nearly all of us may be expected to become antimilitarists when the war shall have ended. We shall be one and all willing to strive to see that peace and not war, lawful justice, and not might of armies determine the world's future. Happily the world's common people are today aroused and united upon that program.

As Americans the struggle is largely up to us. It is the English-speaking navy which will be predominant when war ends. It is the American alone of the greater allied armies of high efficiency which will emerge from the European fields of death not yet war-wearied,

our youth still alive. Shall we drift along into another "Armed Truce"—America henceforth must take part, whether or no—or shall we seek to deal with our brother humans in another language than that of TNT? Yes, "the spiritual Esperanto" is our aim, and the spirit of Esperantism, and the spiritual, with and thru the use of Esperanto.

But why Esperanto? Why not English? Can't all nations learn English (so as to save us trouble, of course)? Besides the objections common to all national and evolved languages, English has a few additional:—we present the following clipping from the L. A. W. Bulletin for thought.

**Auto Rules in Japan.**—The Japan Chronicle gives some of the rules posted up by the authorities in Japan for the guidance of English-speaking autoists, as follows:

"You must drive your automobile at the speed of eight knots per hour on the city roads and twelve knots per hour on the country roads.

"When you see the policeman throwing up his hand you must not drive in front of him. When you get ahead of the passenger on foot or horse you must ring the horn.

"When you meet the cow or the horse speed slowly and take care to ring the horn and not be afraid of them. Drive slowly when you meet the horse or the cattle, do not make them afraid and carefully make the sound. If they afraid the sound you must escape a little while at the side of the road till they pass away.

"Do not drive the motor-car when you get drunk and do not smoke on the driver seat."

Probably a translation the other way would be worse. For good and sufficient reasons our American peace commissioners do not use French. Translators are required, 23 for each of 23 nations. The League of Nations is starting under a handicap. Will everyone understand and support? We Esperantists, then, stand for world sympathies, for a world vision, for the nations getting together and adopting peaceable methods of accommodation as has long been the rule between private individuals. We Esperantists stand for the universal teaching of Esperanto as the first means to that end, and we have faith not only in that means but in our ability to prove its efficiency to anyone, once we are given a fair hearing. No true Esperantist is ever ashamed of being known as an Esperantist; every convinced Esperantist ought to allow his name to be used, no matter how low or high his station. The day of ridicule has gone by; yes, and the day of laughter for very nearly a fourth of the world.

[Isn't it high time **you** were out in the open, showing your colors?]

---

—Malfermu la fenestron, kelnero, ekkriis vespermanĝinto. Estas varmege.

—Fermu la fenestron, kelnero, estas malvarmege, protestis homo kiu jus eniris.

La kelnero hezitis, kaj la posedanto de la restoracio tuj solvis la aferon, dirante:

Obeu al la kliento kiu ankoraŭ ne manĝis.

**El Esp. Mo.**

## SALUTOJ

The Executive Committee of the E. A. of N. A. has decided, after careful consideration, to accept the invitation of the Esperantists in Montreal to hold the 1919 convention in that city. Personally I am convinced of the wisdom of this decision. The 1918 convention was held at Green Acre, Eliot, Maine, and was attended by a goodly number of eminentuloj and also friends of the language who wished to become familiar with the language itself and its purpose. On their return to Montreal action was at once taken for the formation of a group, and the results have been most satisfactory. Under these conditions the Executive Committee realized the importance of extending to our companions in Canada every possible courtesy and consideration, especially as Canada is an important part of the E. A. of N. A., and should be given every possible help. It is also felt that a portion of *Amerika Esperantisto* should be devoted to the interests of the Canadian Esperantists and it is requested that the various groups will send items of news, progress of work, etc., to the A. E. for publication.

At the convention in 1918 we were welcomed by Mr. Alfred E. Lunt, chairman of the Green Acre Fellowship, with a heart touching speech, in which he said:

"As trustees of the Green Acre Fellowship, we feel it is a rare privilege to have this body meet with us here to hold their Congress. We feel that in your coming you are obeying a great spiritual law, for the purpose and ideal of Green Acre is something the same as your own. The law of attraction draws to it the like and repels the unlike. I hope your every moment here will be permeated with the spirit of our fellowship.

"It is a great historic fact that great things do not occur in the so-called 'orderly way,' but in most unexpected ways."

To us the above living words seem prophetic, inasmuch as the Canadian Esperantists came to mingle with us quite unexpectedly and thereby opened wide the gates for the greater progress and betterment of conditions regarding our interests in Canada. We believe that the decision reached by the Executive Committee will be justified by the results.

EDWARD S. PAYSON, President E. A. N. A.

Philadelphia, Pa., 2an de Februaro 1919.

Membroj de Pola Episkopa preĝejo aranĝis kune kun la Esperantistoj t. n. patriotecan vesperon kun paroladoj pri la Polujo, kantoj, deklamadoj, k.t.p. Kaj ankaŭ sur la programo troviĝis Esperantista himno "La Espero," parolo pri Esperanto, k.t.p. La himnon kantis ĥoro konsistanta el Polaj kaj Litvaj geesperantistoj kiu tre plaĉis al aŭdantaro, kvankam ili ne komencis ĝiajn vortojn, tiom ke per aplaŭdoj devigis la kantantojn kanti pluan kanton "Fidela Rondo." Post la kantoj Pastro D-ro J. Pienionzek faris paroladon pri Esperanto, ĝia disvastigado en la tuta mondo, k.t.p. kaj volontigadis aŭdantaron precipe gejunulojn subteni tiel belan ligojon Esperanto kaj studi ĝin (tute senpage ĉar lecionoj estas donataj sub numero 507 N. York Ave., mardon vespere ĉiu-semajne) kaj ankaŭ oni anoncis ke sekvantan dimanĉon, t.e. 9an de Februaro, okazos la unua kunsido de polaj Esperantistoj.

En la difinita tempo dekelke da interesatoj kunvenis por ke aperu la volo lerni Esperanton al kiuj organizanto S. Zysk malfermante la kunsidon ekparolis kelke da vortoj por danki al ili por subtenado kaj ankaŭ al D-ro J. Pienionzek por helpo en organizado k.t.p. Sekve la novaj interesatoj aliĝis al societo en nombro 16 kiuj el inter si elektis la jenan oficistaron.

Prezidanto kaj Kasisto: Pastro D-ro J. Pienionzek.

Vicprezidanto: A. Kwincinski.

Korespondanta Sekretario: S. Zysk.

Financa Sekretario: I. Nowak.

Bibliotekisto: B. Leszczyński.

### ĈE LA CENTRA OFICEJO

Paris, 6, 1, 19.

Estimata Samideano:

Multaj samideanoj skribas al ni por peti, ke ni utiligu Esperanton dum la pactraktado por traduki la dokumentojn kaj tiel diskonigi ilin. Por pli bone klarigi tion, kion deziras la petantoj ni aldonas leteron de belga samideano, kiu plej klare difinis la ideon, kiun ni mem multe pripensis kaj jam perlaboris.

Liege 8, 12, 18.

. . . Sajnas certe, ke la nuna momento taŭgas pli bone, ol kiu ajn por elmontri la belan rolon, kiun la Esperanto povas efektiviĝi en la internaciaj rilatoj. Baldaŭ malfermiĝos la packongreso. En la tuta mondo ĉiuj interesiĝos al ĝi kaj avide legos, kiel eble plej frue, la ĉiutagan raporton de la kunsidoj.

Por elmontri la utilecon kaj efikecon de nia lingvo mi dezirus tion ĉi:

Grava Esperantista grupo en Parizo eldonu ĉiutage la raporton de la packongresa kunsido.

Tiu bulteno estu dividita en du fakojn.

La unua donas la laŭliteran reprodukon laŭ la stenografia raporto), t. e. **per originala lingvo**. Apud, en la dua fako, estas presata la Esperanta traduko.

Por ke la traduko estu kiel eble plej bona, esprimante taŭge la plej subtilajn nuancojn, konvenas, ke ĉia parolado estu tradukita de iu kies la patrolingvo estas tiu uzita de la parolanto.

En urbo kiel Parizo, vi sendube ne estos embarasata por havi tiajn tradukistojn je via dispo.

Por plimalgrandigi la prezon de la bulteno, mi opinias, ke ĝi estu presata sur sola folio, sed dividata en paĝojn tiamaniere, ke faldinte ĝin la aro havu aspekton de revuo. Laŭ mi la paĝoj devus esti proksimume Cm. 12 x Cm. 15. Tiel la broŝureto povus esti, ne difektigita metata en poŝon, kaj la povebleco legi ĝin en vagonaro aŭ tramveturilo fondus bonegan propagandan rimedon.

Sed kiel dissendi tiujn foliojn?

Mi pensas, ke ĉiutage, ĝi devus esti enmetata, se eble senpaga aldonon, en ĉiutaga ĵurnalo tre disvastigata en ĉiuj landoj, ekzemple, "Le Petit Journal," "Le Matin," aŭ "Le Journal."

Post la fino de la kongreso vi povus plie kunigi la diversajn foliojn restantajn en vendeblajn broŝurojn.

Tiuj ĉi certe fariĝus precioza dokumento, kiun la samideanoj kaj multaj aliaj volos posedi.

La multegaj rilatoj, kiujn la esperantaj grupoj de Parizo havas permesus, mi estas certa, ke tiu ideo estu efektivigata.

Al vi mi submetas mian projekton laŭ ĝia valoro,

Oger.

93, rue de Cointe, Liege (Belgique).

Se konforme al la propono de nia belga Samideano, ni farus tiun tradukon el ĉiuj lingvoj en Esperanton, kaj ni dissendus tiujn dokumentojn kiel eble plej vaste, kun la originala lingvo apude, estus tre grava propagando, kaj certe tio utilis al nia movado.

Por tion efektiviĝi ni estas pretaj doni niajn tutajn fortojn, sed ni timas, ke niaj monrimedoj ne estas sufiĉaj pro la nunaj prezoj de la presado kaj de la papero.

Se vi opinios taŭga la ideo esprimata en la aldonata letero, kaj se vi komprenos la gravecon de tiu propagando, bonvolu diskonigi kiel eble plej vaste kaj rapide tiun ideon kaj niajn projektojn, por ke ni povu kunigi, se eble, monrimedojn por ilin efektiviĝi.

La personoj kiuj donos monon ne devas esperi iun profiton; ĝi estos destinata al la propagando, sed kompreneble ĉiuj esperantistoj kiuj estos donintaj sufiĉan monsumon ricevos la dokumentojn. Ĉiu sumo estos kvitancita. Listo de mondonacintoj estas presigota. La personoj kiuj ne volus, siaj nomoj estu presitaj bonvolu averti pri tio la personon al kiu ili sendos monon.

Ni ne celas la Esperantistojn, sed la publikon. Ni do provu kiel eble atingi ĝin.

Se vi havus pli taŭgan opinion pri tio, bonvolu rapide komuniki ĝin al ni, kaj ni profitos ĝin kiom eble, por la bono de Esperanto.

Por eviti tro gravan laboron al ni estus preferinde ke en ĉiu urbo aŭ lando iu persono kolektu la monon kaj sendu ĝin al ni.

Pro la graveco de la laboro formiĝos komisiono por zorgi pri ĉio: taŭgaj tradukistoj, presistoj kaj kontoj.

Mi esperas vian fruan respondon ĉar la tempo urĝas, kaj kvankam ni komencos tuj la laborojn ni bezonos viajn helpojn por ilin daŭrigi efike dum la tutaj paclaboroj.

Bonvolu akcepti, Estimata Samideano, miajn sincerajn salutojn.

E. F. Cense.

La monon oni povos sendi je la nomo de S-ino. E. F. Cense (51, rue de Clichy, Paris), kiu tuj respondos pri la ricevo, kaj transdonos al la komisiono kiam ĝi estos formita.

Several New York <sup>\*</sup> friends, <sup>\*</sup> we understand, <sup>\*</sup> have <sup>\*</sup> contributed <sup>\*</sup> to this invaluable work and all contributions for this purpose reaching the Esperanto Office will be immediately forwarded.

#### Kial ĝi estis malfacila

“Vi devas kompreni ke mi akiris mian monon per laborego.”

“Nu, mi opinias ke vi heredis ĝin de via onklo.”

“Tiel estis; sed mi devis laboregi por havigi ĝin al mi de la advokatoj.”

El “Boston Transcript.”

Trad. Efodo.

## LA ESTONTA DANĜERO

Kiam mi estis infano, kaj miaj ideoj pri la mondo estis terure simplaj, oni multe parolis pri certa "estonta danĝero." Kaj kvankam kelkaj jaroj jam pasis, mi bone memoras la elokventecon de mia onklo Petro, penante konvinki mian patron.

—Jes, ili venos! Ho! nenia dubo! . . . Kaj, kiu povas haltigi ilin? Neniu! . . .

Estis la popola rakonto pri la "flava danĝero." Mi certe ne intencas pritrakti en tiu ĉi artikolo, ĉu tiu rakonto enhavas "iom" da realeco, aŭ estas nur simpla rakonto. Anstataŭ turni miajn okulojn al Azio, mi ilin turnas al Eŭropo kaj Ameriko.

Tri sudamerikaj nacioj atentigis jam de longe la eŭropajn kaj usonajn komercistojn—Argentino, Ĉilio kaj Brazillando. La riĉeco de tiuj nacioj estas diversspeca, sed en ĉiu el ili ni ĝin trovas kuŝanta aŭ ripozanta sur la tero. Ĉilio—minejoj kaj ĉevaloj; Brazillando—kafo kaj kaŭĉuko; Argentino—bovinoj kaj greno. Kiam mi veturis al Paragvaja Respubliko mi vidis la senfinajn ebenaĵojn de Argentino, kie miloj kaj miloj da bovinoj paŝtas sub la plumbopeza suno, vane serĉante arbojn por ŝirmigi; kaj ĉe la alia flanko, maro da orkoloraj spikoj perdiĝas en la malproksimeco de la horizonto.

Argentinan Respublikon oni konsideras kiel la plej riĉan nacion de Suda Ameriko, kvankam "nacia industrio" estas preskaŭ nevidebla. Iru al Buenos Aires, kaj vi vidos milojn da aŭtomobiloj "made in Germany" aŭ "made in U. S." Eniru iun ajn vendejon, kaj malnova kantajo resonos al viaj oreloj:

—Vi devas konsideri, Sinjoro, ke tiu ĉi ĉapelo estas 'usona,' tiu razilo estas 'franca,' kaj tiuj ĉi poŝtkartoj estas 'germanaj.'

Kaj vi demandas:

—Kion, do, vi fabrikadas en Argentino?

—Ho, Sinjoro! Ni 'fabrikadas' bovinojn kaj grenon. Tio sufiĉas al ni.

Mi scias, tamen, ke dum la milito, oni sukcesis **krei** en Argentino kelkajn 'novajn industriojn,' pri kiuj mi multe dubas, ĉu ili vivos longe. Ni vidu kial:

Taga salajro kiun oni pagas al la laboristoj en Argentino:

Al la plej lertaj . . . . . 5 pesos,\*

Al la ne-tiom lertaj . . . . . 4 pesos,

Al la nelertaj . . . . . 3 pesos.

Ni kalkulu, do, 4 pesos kiel ĝeneralan salajron, kaj ni imagu, ke ni havas dek laboristojn. Oni bezonus, ĉiutage, 40 pesos por pagi la laboron de tiuj homoj. T.e., kvanto sufiĉa por aĉeti 100 frankojn, aŭ 100 markojn aŭ 100 kronojn. Tiu kalkulo estas bazata je la valoro de tiuj moneroj antaŭ la milito. La diferenco inter frankoj, markoj kaj kronoj, en tiu tempo estis tre malgranda. Nun eble 35 pesos sufiĉas. Sed ni konsideru, ke 'kiam ĉio estos aranĝata' oni bezonos 40 pesos.

Salajro kiun oni pagis—kaj eble oni pagos 'post la aranĝo'—al la laboristoj en Francujo, Aŭstrio kaj Germanujo, po tago:—5 frankoj; 5 kronoj; 5 markoj. Tio estas, 100 fr. aŭ 100 kr. aŭ 100 mk. estas mono

\* "Peso," Argentina monero valoras se ora ĉirkaŭ 2 sm., se papera ĉirkaŭ 1 sm.—Red.

sufiĉa por pagi la taglaboron de 20 homoj. Kaj 40 pesos—mono sufiĉa por aĉeti 'ĝin.' (Per tiu sama kvanto—ni ne forgesu tion—ni povas pagi, en Argentino, nur la tagan laboron de 10 laboristoj.)

Nun: Ni bezonas 2.35 pesos por aĉeti unu dolaron. Ni kalkulu, kiel ĝeneralan salajron en Usono, \$3 po tago. Por 'aĉeti' la labron de unu sola usona laboristo, ni bezonas 7.05 pesos, kvanton preskaŭ sufiĉan por 'aĉeti' la laboron de 4 eŭropaj laboristoj.

Usono sukcesis, dum la milito, anstataŭi eŭropajn produktaĵojn en Suda Ameriko, 'tial ke estas neeble havigi ilin el Eŭropo.' Mi aŭdis tiujn vortojn tre ofte en Buenos Aires kaj Montevideo. Ekzemple:

Post du jaroj da milito mi eniras vendejon en Buenos Aires, intente aĉeti martelon.

—Kia estas ĝia prezo?

—Du pesos, sinjoro.

—Kial du pesos? Antaŭ la milito mi aĉetis martelon je la sama klaso kaj mi pagis nur unu peso.

—Vi estas prava, sinjoro. Sed nun ni ricevas nur usonan komercaĵon. La martelo kiun vi aĉetis antaŭe eble estis franca aŭ germana. Tiu ĉi estas usona.

Kompreneble, tiu klarigo tute ne ĝojigis min, ĉar la diferenco inter unu peso kaj du pesos ne estas komedio, sed melodramo.

Usono eniris la militon post tri jaroj, kaj ni ĉiuj komprenas, ke la perdo da centmil homoj signifas, komparative, nenion al nacio kiu enhavas 100,000,000 da enloĝantoj. Sed dum la unuaj tri jaroj Francujo, Aŭstrio kaj Germanujo perdis la junularon, tiujn homojn kiuj en paca tempo laboradis en la grandaj fabrikejoj, bazon de la nacia riĉeco per la eksporto; kaj dum la milito, en tiuj landoj virinoj lernis mehanikon kaj aliajn metiojn, tiom bone, ke la plimulto el ili povas jam konkuri la laboron de la viroj.

La milito estas finita. La milionoj da viroj kiuj mortis sur la batakkampoj neniam reiros hejmen. Sed, du longaj vicoj da homoj tion faros: kriptuloj kaj malsanuloj. Tiuj ĉi homoj malmulte povos helpi la finanĉan 'rekonstruon' de la ŝtatoj, kaj se tiuj ŝtatoj bezonas monon, kaj oni ĝin obtenos per vendo de enlandaj produktaĵoj al ali-landaj popoloj, la komerca batalo inter ĉiuj la nacioj partoprenintaj la militon estos terura.

Kie estas la estonta danĝero?—eble vi demandos. Kalkulu la diversajn moner-valorojn de la sud-amerikaj landoj, kie nacia industrio estas preskaŭ nevidebla—kaj memoru, ke por krei fratan senton inter la homoj ni bezonos internacian helpan lingvon. Sed por malhelpi la ekspluatadon de la laboristoj ni bezonos internacian mon-sistemon.

Jako Vilaseca,

Internacia Delegito de 'Argentina Esperanto-Asocio.'  
New York, Nov. 1918.

Instruisto—Ĉu vi scias ion pri gramatiko?

Knabineto—Mi ja opinas tion.

Instruisto—Nu, gramatike analizu ĉi tiun frazon: "Li ŝtelis la vi-  
andon." Kio estas "li"?

Knabineto—"La ŝtelisto," kompreneble.

—Esperanto Monthly.



## ESPERANTO-PAROLEJO

Esperante sole: ne pli ol 500 vortoj; por iu senpage: nomo kaj adreso postulataj  
Esperanto only: not over 500 words: free to all: signature and address required

The editors and association do not sponsor any statements under this head; facts and sentiments of each are on the authority of the person signing.

## LETEROJ AL AMERIKAJ BAHAAŬOJ, 1906 KAJ 1913

Ho vi infanoj de la Regno!

Estas Novjaro, kio signifas, la rondiro de la jaro. Unu Jaro estas la esprimo de ĉirkaŭiro de la suno, sed nun estas la ekkomenco de ciklo de la Suno de Realeco, Nova Ciklo, Nova Epoko, Nova Tempo, kaj Nova Jaro. Pro tio ĝi estas tre benata.

Mi volas ke tiu ĉi beno aperu kaj elmontriĝu en la vizaĝoj kaj karakteroj de la kredantoj, por ke ili ankaŭ povu fariĝi novaj homoj, kaj trovinte novan vivon kaj estinte baptitaj per Fajro kaj Spirito, povu fari la mondon, nova mondo, por ke la manova tero malaperu kaj la nova tero elmontriĝu; malnovaj ideoj foriĝu kaj novaj pensoj venu; malnovaj vestoj estu forjetitaj kaj novaj vestoj estu surmetitaj; antikva politiko, kies fundamento estas milito, estu forigita kaj moderna politiko fondita sur paco levigu la standardon de venko; la nova stelo lumigu kaj brulu kaj la nova suno ilumigu kaj radiu; novaj floroj floru, la nova printempo fariĝu sciata, la nova venteto blovu, la nova bonfarado malsupreniru, la nova arbo donu la novan frukton, la nova voĉo eksonu kaj tiu ĉi nova sono atingu la orelojn ke la nova sekvu la novan kaj ĉiuj malnovaj meblaro kaj ornamajoj estu forjetitaj kaj nova ornamajaro anstataŭu ilin.

Mi deziras al vi ĉiuj ke vi havu tiun ĉi grandan helpon kaj partoprenu tiun ĉi Bonfaradon kaj ke en spirito kaj koro vi penu kaj klopodu ĝis la mondo de milito fariĝos la mondo de paco, la mondo de mallumo, fariĝu la mondo de lumo; satana konduto estu ŝanĝita en ĉielan konduton, la ruinitaj lokoj estu rekonstruitaj, la glavo estu ŝanĝita en la branĉon de Olivo; la ruĝigo de malamo fariĝu la Flamo de la Amo de Dio, kaj la bruado de paŭlo, fariĝu la voĉo de la Regno; la militistoj de morto fariĝu la militistoj de vivo; ĉiuj nacioj de la mondo fariĝu unu nacio; ĉiuj rasoj fariĝu unu raso, kaj ĉiuj naciaj himnoj fariĝu unu melodio. Tiam tiu ĉi materiala mondo estos paradizo, la tero estos ĉielo kaj la mondo de satano fariĝos la mondo de anĝeloj.

Sur ĉi estu saluto kaj laŭdo.

Abdul Baha.

Ho servantoj de la mondo de la homaro!

Feliĉa estas via stato, ĉar via celo estas filantropia kaj via espero estas la Unueco de la mondo de la homaro. Unu el la kaŭzoj de mal-kompreno inter la nacioj estas la diverseco de lingvoj. Vi nun klopodas antaŭenpuŝi la universalan helplingvon. Do, klopodu, ke vi posedu perfektan elokventecon en la esprimo de tiu ĉi lingvo Esperanto kaj ekstaru por disvastigi ĝin. Sed faru tiun ĉi lingvon rimedo por disvastigi la Diajn Aromojn, ĉar tio ĉi estas la kaŭzo de la Vivo kaj la rimedo de la Savo.

Sur vi estu Baha el-Abha!

Abdul Baha.

Tradukis Martha L. Root, Cambridge Springs, Pa.

## OUR EXCHANGES

We have received at this office a number of Esperanto and other periodicals, not hitherto acknowledged, in which we note the following valuable articles (those in Esperanto in boldface type):

The World Salesman — Dec.-Jan. — Esperanto and reconstruction, Machinery market in China, Japanese in Siberia, Vegetable dyes of China, Statistics of Brazil and Span-American countries, trades in Manchuria, Australia, the Philippines, sections in Russian and Spanish.

Feb.—Dye traffic (Hongkong), Rugs of North China, Japanese tobacco factories. Canada's trade increase, Siberian Klondike, section in Russian, including "Esperanto as the common commercial language," Russian-English commercial vocabulary terms, Spanish, Japanese and Esperanto sections, the latter with Esperanto text and lessons for business men.

Esperanto—Dec.—**Foundation of an International League, Esthonia** (hist.), **commercial agent in Senegal, Gorky's Nuncia, termination of geographic names.**

Esperantista Voĉo—Nov.-Dec.—**Zamenhof's way the right way, Language department, letters from Budapest and Silesia.**

British Esperantist—Jan. —**A gladder year**, chronicle, plans for 10th Brit. Esp. Congress at Liverpool.

Esperanto Monthly—Jan.—Commercial Esperanto (first four weeks' lessons).

France Esperanto — Sept.-Dec. — Meillet's Tongues of the New Europe, the magazines, **Esperanto in the School.**

Le Monde Esperantiste—Nov.-Dec.—English or Esperanto, Tolstoy's **In the Carpathians; Byron's Cain**, study outline.

Eklezia Revuo—Jan.—Literary contest, **missionary problem in Egypt and Palestine, Keat's Fantasy**, etc.

Flores de Loto—Nov.—Mexico, organ of Vedanta Society, "Ananda," What death is (metempsychosis), What the Sphinx tells us, numbers and their significance, sickness and its cause, etc.

The Equitist, Economist, Our Dumb Animals, Boston Ideas,

Libera Toronto—April, 1918—an all-Esperanto bi-monthly literary review, 6 roubles, at No. 48 Birja psk., Saratov, Russia (probably no postal facilities as yet, mentions also Volga Stelo and Volga Pioniro as appearing and a workman's gazette as about to be issued by the Samara Esp. Soc. Kazanskaja No. 159, care of V. S. Nasarov), selection from Kropotkin's **Bread and Freedom**, Cernov's **White Miracle**, pt. 1, poetry, including the following call by Torentano:

Pensoj eteraj, pensoj arogaj, fluu ŝprucante  
Kantoj liberaj, kantoj allogaj, sonu konstante  
Mondo vekigās, ĉenoj jam krakas, baldaŭ forfalos  
Novo naskigās, vivon enbrakas, venkon signalas.

Ĉiuj korjunaj, veron amantaj, brave ni iru  
Per la komunaj penoj ardantaj venkon akiru  
Flirtu standardoj, montru emblemojn del' Nova Sento  
Venu, ho bardoj, portu korgemojn al la "Toronto."

One more admonition by Mihalski from Madon strikes home, whether for Russia or Usono:

En la viv' maldolĉa sonas ŝia voĉo  
Vi ekvidos multajn, en dormema stat'  
Ne kondamnu ilin akre kun riproĉo  
Sed, karulo, amu ilin kiel frat'.

### Words Sometimes Misused

**Afero** is confused with **objekto**. **Afero** is an abstract thing, a **matter**, while **objekto** is a concrete thing, an object or **article**. Cp. Ekzercaro 13:3, 41:14, 42:1 with 40:15, 27:1, 35:13, 37:14.

**Favoro** is sometimes misused for **komplezo** in a phrase like "to do a favor." For the distinction note:

Tutan vivon daŭras Lia **favoro**.—Ps. 30, 6.

His favor is for a lifetime.

and,

Si tiris sian edzon flanken kaj postulis **fari al ŝi la komplezon** kaj rigardi lin.—Zamenhof's Batalo de l'Vivo, p. 57.

She drew her husband aside and insisted on his doing her the favor of looking at him.

**Funebro** is not a **funeral**.

Akra estas funebro!—Bitter the **mourning!**—Krestomatio, p. 379.

Note **porti funebro**n, to wear mourning.—Marta.

"Funeral" is **enterigo**.

Mi alveturis al la **enterigo** de via patro.—Krest., p. 418.

I came to attend your father's funeral.

Distinguish **karbo**, "coal" and **karbono**, "carbon." Also, **karbo** is generally used in the plural (as they speak of "coals" in England).

**Magistrato** is not a "magistrate" but "a municipal government," mayor and councilors, etc.—Kabe's Vortaro. Also note.

Laŭ la ruĝa mantelo kaj la ora kolĉeno oni povis rekonu la **ĉefmagistratanon**.—Zabeno de Baharah, p. 291.

By his red robe and the gold chain about his neck one could tell the portly burgess.

"Magistrate" is **juĝisto**.

**Prava** is "right" not in the moral, but in the intellectual sense. Thus Zamenhof, in his Lingvaj Respondoj (No. 3), answering a correspondent who asks if **eksidi** is not better than **sidigi** says, "Vi estas **prava**." For the moral sense, note—

Eĉ knabon oni povas ekkoni laŭ liaj faroj, ĉu estas pura kaj **justa** lia konduto.—Sentencoj de Salomono, 20:11.

Even a child maketh himself known by his doings, whether his work be pure, and whether it be **right**.

Infanoj, obeu al viaj gepatroj en la Sinjoro, ĉar tio ĉi **decas**.—Efesanoj, 6:1.

Children, obey your parents in the Lord, for this **is right**.

Also simple **bon-** is used in this sense, as Johano, 18:23.

**Senco** is a synonym of **signifo** (more especially the "meaning" of a word or phrase). It is not "sense" in the sense of "feeling." Thus, "the five senses" are **la kvin sentoj**. "A sense of justice" would be **justsento**, "a sense of honor" **honorsento**, etc.

## FOR THE BEGINNER

(Anekdoto from the Fundamenta Krestomatio.)

Unu malgranduso veturis sur veturilo. Subite la veturilo kliniĝis: ĝi trafis en kavon. La malgranduso desaltis kaj provis levi la veturilon, sed ne povis. Tiam li kolektas siajn fortojn kaj vokas pro helpo la sanktan Nikolaon. Sed ankaŭ tio ĉi ne helpis. Tiam en mal-espero li krias:—Ĉiuj sanktuloj helpu! kaj puŝas la veturilon kun tia forto, ke ĝi renversigas sur alian flankon.—Jen vi havas! li ekkriis kolere: vi ne devis puŝi ĉiuj kune!

## Notes

**Unu**: see note on Oct. **anekdoto**.—**malgranduso**: not (as is evident from the context) a reference to stature, but to Little Russia, a southern province of the former empire. Notice that Z. begins names of **races** with little letters, unlike Eng. (see Ekz. §37). But names of **countries**, cities, etc., are capitalized, and if the name of the citizens are derived from the name of the country, etc., the capital letter is still retained (thus **Parizanoj**, **Rusujanoj** in Ekz.). How does a **Rusujano** differ from a **ruso**?—**veturis**: learn the different words for “traveling”; **vojaĝi** = to travel (general sense), **veturi** = to travel by any mechanical means, **rajdi** = to travel on any animal. We also have **vojiri**, which in classic usage always refers to travel by foot or slow vehicle (cp. Nom. 9, 10, P. A. 115, E. F. 97, etc.) **migri** = to lead a nomadic life, to “tramp.”—**veturilo**: strictly “any kind of vehicle,” but commonly used for **ŝarĝveturilo**, a cart or wagon.—**kliniĝis**, “tipped over.” Dist. **klini** and **inklini**: the former is physical “leaning,” the latter mental “leaning”; also **klini** is transitive, **INKlini** INtransitive. (Remember **-ig** makes intransitive verbs transitive.)—**trafis**, “had struck,” etc. Good authors seldom use compound tenses in the active voice; cp. **veturis** above (“was riding.”)—**kavon**, a rut,—not a “cave” (**kaverno**). **Kavo** is literally a “hollow,” whence the adj. **kava**, hollow. It may also mean a “ditch” (F.K. 333), a pit (El. 21, 33), a hollow (Bah. 293), a cove (P. A. 73), etc., the context always determining what word best renders it. Why **kavoN** (accusative)? (P. G. rule 13) **desaltis**: **de** in composition not infrequently has the sense of “down.”—**provis**: **provi** strictly speaking = “to test” (as F. K. 66), but is commonly used loosely for **peni**, “to try.”—**kolektas**: the historical present is used in Esp. as in all languages.—**fortojn**: note the plural, where in Eng. we would use the singular.—**vokas pro helpo**: Kabe has **vokoj pri helpo** (Far. I, 143)—**la sanktan Nikolaon**, Saint Nicholas: the article **may** be used with a proper name preceded by an adjective (Fr. III, 15), or it may not (as **Sankta Vito**, Rab. 22).—**ankaŭ** regularly precedes the word it modifies, as do **ne**, **nur** and other uninflected modifiers: a change of word order with such words would usually cause a change of meaning.—**tio ĉi ne helpis**, “this did no good.” Always render into idiomatic English. It is interesting in these anecdotes to note Z.-ian equivalents of Eng. colloquial expressions.—**Jen vi havas!** “There you go!”—**vi ne devis puŝi**, “you didn’t have to push,” etc. How would you render **ne devis puŝi**; **vi devis ne puŝi**? Cp. note on **ankaŭ** above. (However, **ne devis** and **devi ne** are often loosely confused even in good writers.) **Devi** strictly speaking implies moral obligation rather than physical necessity, tho often used also for the latter.

## Exercises

(Using only roots in the Anekdoto and Notes, and the Ekzercaro.)

La patro estas hispano.—Mi mem estas Francujano.—La frato estas Berlinano, kvankam ne germano.—Mi iros hodiaŭ al la urbo.—Kiamaniere vi iros? ĉu vi veturos aŭ rajdos?—Nek unu nek la duan (mi faros); mi iros piede (or piediros).—Rakontu pri via vojaĝo.—Ni longe vojiris, ĉar la lando estis sen fervojoj.—Ni tamen ne migris, ĉar nia vojaĝo havis difinitan celon.—Kiamaniere vi vojaĝis?—Estis vintro, kaj ni veturis sur glitveturilo.—La ĉasisto klinis la pafilon kontraŭ la arbon.—Pregante oni klinas la kapon.—Mia ĉapelo defalis de la kapo; mi min klinis kaj ĝin levis.—Bona homo inklinas al bonaj faroj.—Bona homo inklinigas aliajn al bonaj faroj.—Vi estas homo de bonaj inklinoj.—La ŝtono, kiun mi jetis, trafis la celon.—La dentisto trovis kavon en la dento.—Kava bastono facile rompiĝas.—La laboro estas super miaj fortoj.—Je mia voko pro helpo neniu respondis.—Jen la preĝejo de Sankto Petro.—Infano, ne ploru; tio ne helpos.—Jen vi havas! vi malbonigis la tutan laboron.—Gardu vin! ne renversu la tablon.—Per sia lasta puŝo la francoj tute venkis la malamikon.—Al mi! mi vin vokas. Mi vokas ne lin, sed vin. Ne Johano vin vokas, sed mi. Rapide! mi ne vokus vin, se mi vin ne bezonus.—Ankaŭ Marion mi bezonas. Venu mem kaj ankaŭ venigu ŝin.

## FOR ADVANCED STUDENTS

We hope to have an Esperanto translation of at least a part of the 26 articles of the League of Nations for our next issue. Compare your own translation with ours; if ours does not satisfy you, then it's up to you to furnish us with better.

## Al la Memoro de Nia Majstro

Por li, kiu gajnojn facilajn rifuzis,  
Kaj nur por homaro la vivon eluzis;  
Por li, kies nomo perdiĝos neniam,  
Sed restos amata kaj sankta por ĉiam;  
Por li, kies agoj la mondon ja benas;  
Por li, nia Majstro, hodiaŭ ni venas.  
Se laŭdus ni lin per literoj el oro,  
Ne estus sufiĉe por lia memoro.

Malfortaj ni estas, malgranda la rondo;  
Sed li apartenas al tuta la mondo.  
Per liaj laboroj montriĝas la vojo.  
Al homa frateco kun paco kaj ĝojo.  
Ni ŝparu do laŭdojn; la vortojn ĉesigu;  
Sed nian fervoron par agoj vidigu.  
La paŝojn de l' Majstro senlace sekvante,  
Ni marŝos de venko al venko konstante.  
La verda standardo de nia afero  
Kondukos la mondon al amo kaj vero.

— James F. Morton, Jr.

## OFFICE NOTES

There are a number of helpful suggestions coming in in answer to our November issue. One from H. Straw of Guilford, Maine, suggests that we print in large type several kinds of posters, telling about Esperanto, "in a few words and in large type" for the propagandist to buy and post.

We believe this is workable without great initial expense and will try to have some ready for sale.

From Seattle, Washington, comes the following letter:

Seattle, Wash., la 27an de Januaro, 1919.

Redaktoro de Amerika Esperantisto.

Estimata Samideano:—

La propono pri propagandmaniero, verkita de Samideano F. C. W., Washington, D. C., kaj presita en Amerika Esperantisto, numero de Novembro, 1918, ŝajnas al mi tre alfarebla kaj farinda: Precipe la unua punkto, pri eldono kaj dissendo de propagandpamfletoj al la instruistoj ĉe la lernejoj en nia lando, mi opinias estas plej grava.

Vi diras, ke plano ne estas farebla pro manko de mono. Sed ĉu vere ne troviĝas en tiu granda lando mil personoj, Esperantistoj kaj simpatuloj de Esperanto, kiuj volas kaj povas aldonaci po kvin dolaroj por tiu celo.

Kompreneble kelkaj samideanoj povas doni pli, aliaj malpli, kaj se ĉiuj agos laŭ povo, mi kredas ke la bezonata sumo estas akirota.

Ĉar mi estas nur laboristo, mi ne povas aldoni pli ol kvin dolaroj, kiujn mi kunsendas en tiu letero.

Ĉu ekzistas en Usono Esperanta korespondanta lernejo? Se ne, kial?

Esperante ke ĉiuj samideanoj partoprenos en la donaco, mi estas via por progreso de Esperanto,

J. J. S.

Who will follow suit,—yes, even until it hurts. We stand ready to prepare or get prepared a convincing propaganda pamphlet, printed in as great numbers as the money received will pay for. At present our plan is to issue this as the April number of the magazine and all contributions will go into extra copies or increased size or attractiveness, according to the wishes of contributors; extra copies unless otherwise specified. The above contribution means 250 propaganda copies. If you see an opening to use copies in your state, send in a statement of how many you can use or a mailing list of the addresses of school authorities, in any case give us full information. We want to hear right away from every place where Esperanto has been or is taught in the schools.

We understand that preparations are on foot for a grand "hadj" to Montreal by way of Buffalo and Lake Ontario. We expect every maple leaf to put on its most festive green in emulation of the Esperanto star, and as for the hungry fishes, well, we expect to see them, otocysts atingle with snatches of Esperanto between meals, follow the boat all the way to the Montreal dining rooms.

Montreal's 50 members are ready to paint the town green for us. Even the band will play "The Wearing of the Green" (in Esperanto, of course, but the children of "the ould sod" will whisper "Sure it's Gaelic, you know").

Once again we appeal to all Esperantists, "live or dead," to let us have names and addresses of all with a present or a past fluent reading knowledge of Esperanto, one year's study or more. Any who object to having their names printed in an adresaro should let us know. [right here let us say that unless you are **ashamed** of being an Esperantist you should let others have the inspiration of your co-operation in the movement. It is true some Esperantists do have ideas not ours, but the bother of perhaps meeting an uncongenial fellow worker ought not to outweigh the value of being able to get at the fellow worker.] Perhaps our readers will note that the single objection the committee of Parliament made was as to the actual number of Esperanto users. If we are asked for figures, what can we say? We want **facts**. Probably 30,000 persons in North America have or have had this fluent reading knowledge. If you can read Esperanto fluently or say enough to be understood, your name ought to be here.

We have received lists of addresses for our adresaro from only the following cities: Wahkon, Minn.; Minneapolis, Minn.; Lake, Ind.; Topeka, Kan.; Manchester, N. H.

We have received from Barnaul, Siberia, a letter of the Kultur-Kleriga Unio of the Altai desiring an opening of business relations chiefly for popular education. This organization has storehouses and selling places for books, rulers, pens, penholders, pencils, colors, etc. The stocks have been exhausted but now that communications are half opened, the union of "Co-operative" is seeking to buy papers to write on (on both sides) and the school supplies above enumerated. They wish that companies with these products send them catalogs and samples. They are in the market also for Esperanto typewriters, and transportable moving-picture machines (not requiring a power plant), books in the English language about education and instruction, about library management, agriculture, museums, etc. Having decided to start a popular museum, with exhibits on co-operation, prohibition, ethnography, commerce and industry, pedagogy, natural history, political economy and sociology, life of workmen and professional men, for all these things they call upon the Esperantists of the world to help. They agree to repay the cost, together with the postage, of any article of consequence bought on their behalf,—cost to be stated in spesmiloj (half dollars). Preferably they desire to exchange articles of interest to the senders. Articles should be marked as not for commerce but for the Museum in order to escape censor and tariff. Address I. Serisev, Tomsk strato 84, Barnaul, Siberio, Azia Rusujo. These Kooperatives are the ones who have held eastern Russia and the empire beyond the Urals against all foes of the allies and of order. Whatever happens in European Russia in Siberia the cooperatives are well organized governments, which have made a brilliant success of their undertakings under extreme handicaps. Here is an opportunity to do them a good turn and to put their democracy on a safe basis of popular education.

## DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje: 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

F-ino Elva D. Kellogg, Arnolds Park, Iowa. 3

F-ino Cora Fowler, 208 S. Locust St., Champaign, Illinois, Usono. 3

Margeret Smart, 1105 W. University Ave., Urbana, Illinois, Usono. 3

F-ino Alice Desprez, Aze, Saone-et-Loire, Francujo—kun Amerikoj, kaj precipe kun Usonaj soldatoj.

Oscar Kalliokoski, R. A. — Box 71, Parlier, Cal., Usono, deziras korespondi kun junaj gesamideanoj en Kubo kaj Suda Ameriko. 4

S-ro Harold Straw, Guilford, Maine, Usono.

S-ro Matias Diaz, Sarmiento 74, Bahia Blanca, Argentina. 8

S-ro Jose Pech, Strato Atacama 156, Bahia Blanca, Argentina. 8

S-ro Gil Goncalves, Rua de Sao Luiz 129, lo Edo., Lisbon, Portugal. 8

Armand B. Coigne, 2633 Creston Ave., New York, Usono, serĉas inteligentajn kunlaborantojn en psika enketado. Korespondos pri nenialia temo, kaj NE RESPONDOS al PM aŭ PK kolektantoj. tf

S-ro Francisco Costa, Rua de Arrabida 90, lo Edo., Lisbon, Portugal. 8

---

# The Surprises at Sylvia Farm

## A Propaganda Play in Five Acts

By HENRY W. FISHER

Ex-President of the E. A. N. A.

THIS IS A VERY CLEVER LITTLE PLAY, AND A WELCOME ADDITION TO OUR LIST OF PUBLICATIONS.

MR. FISHER has paid the whole expense of publication and offers the entire receipts from its sale for the use of the Central Office in propaganda work. Will you meet him half way, and enable us to dispose of the entire edition of 1000 copies at once?

25 cents per copy, postpaid

The Esperanto Office, West Newton, Mass.

---

## “THE WORLD SALESMAN”

(Grown out of the Japan Salesman)

*A Monthly Commercial Review, published in Yokohama, Japan, by an American concern*

THE WORLD SALESMAN is the first commercial journal to have drawn attention to the value of Esperanto as the common commercial language. It has regular articles on Esperanto, and publishes the names of firms using the international language.

**It will keep you posted on World Trade. If you want to do business with the Far East or any other section, IT WILL PAY YOU TO ADVERTISE IN THE WORLD SALESMAN.**

*Advertising Rates on application. Subscription, \$5.00 for two years.*

HEAD OFFICE: 51, YAMASHITACHO, YOKOHAMA, JAPAN.

NEW YORK OFFICE: SINGER BUILDING.

69170